# BROKANTA FOIRO
## “Por kurantaj Esperantaĵoj”

**Leandro Abrahão**

En antaŭa artikolo mi priskribis kelkajn manierojn akiri brokantaĵojn en Esperantujo, kaj sufloris la okazigon de ia brokanta foiro kadre de Esperantista Kongreso. Nu, jen okazos tia foiro kadre de la 11-a Esperanto-kongreso de San-Paŭlo!


La merkato de Esperantaj produktoj estas esence brokanta. Povas esti ke mi troigas, sed... mi ne celas precizecon.


Malmultaj Esperantaĵoj ne fariĝas brokantaj. Multaj verkoj vendataj kiel novaj, estas eldonitaj antaŭ dekoj da jaroj. Malmultaj atingas plurajn eldonojn.

Ordinare libroj, kaj alispecaj Esperantaj varoj eldoniĝas nekvante. Baldaŭ ili fariĝas maloftaj – kaj ĝuste pro tio, valoraj. Certe tio klarigas la emon de multaj Esperantistoj posedi Esperantaĵojn kolekte.

Kiom da libroj kaj Esperantaĵoj vi havas hejme? Kiujn vi havas duoble, eĉ trioble? Kiujn verkojn vi promesis al vi legi, sed neniam legis... kaj neniam legos! Kiujn vi legis kaj neniam legos plu? Kiom da Jarlibroj kaj revuoj restas netuŝate en iu ŝranko aŭ skatolo? Kunportu ilin kun vi al la kongresejo! Kaj ne nur! Kunportu ĉiuspecajn Esperantaĵojn, kiuj povas utili al aliaj personoj.

Tie kadre de la 1-a Brokanta Foiro vi povos donaci, vendi, interŝanĝi aŭ simple montri ilin. Eble vi havas ion tre antikvan kaj kuriozan, kion vi plezure montrus al Esperantistoj. Jen favora okazo.









**Pri la FOIRO**

La Brokanta Foiro havas sole nur du regulojn:

1. Ĉiu partoprenanto donacu almenaŭ unu brokantaĵon al la aŭkcia tablo de la foiro.

2. La prezo de vendotaj libroj estu taksata jene: R$ 0,05 realoj por ĉiu paĝo. Ekzemplo: 100-paĝa libro kostus 5 realojn. Alispecajn brokantaĵojn la vendanto taksu mem. Ĉi tiu regulo estas inspirata je la prezosistemo de la brokanta servo de Flandra Esperanto-Ligo.

En kiu kongrestago ĝi okazos, kie kaj kiom ĝi daŭros, ĉion ĉi estos afiŝita ĉe la retejo de EASP.

## AŬKCIA TABLO

La aŭkcio de la donacitaj brokantaĵoj okazos per kaŝa prezpropono. Sur la aŭkcia tablo estos skatoleto. Kiu partoprenos la aŭkcion, tiu devos proponi prezon sur papereto kaj meti ĝin en la skatoleton. Fine de la foiro la organizantoj anoncos la gajninton. La persono, kiu proponis la plej altan sumon rajtos elekti ĝis kvin brokantaĵojn sur la tablo. La ceteron EASP rajtos ekposedi kaj uzi, kiel estos al ĝi pli oportune.

## EKSPOZICIA TABLO

Kiuj deziros, tiuj povos meti sur ĝin valorajn objektojn. Certe vi havas hejme aferojn, kiujn Esperantistoj volonte rigardus, sed kiujn vi ne povis ĝis tiam montri. Se estos sufiĉe da aferoj, la organizantoj povus aranĝi improvize konkurseton inter la eksponantoj. Kiu estos la plej antikva objekto?